Augustin Wibbelt,

La raneto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Sidas en sunbril' ranet'.
En la verda kalsonet'
bela estas ĝi,
pensas pri neni'.
Venas blanka cikoni',
ruĝajn botojn havas ĝi,
laŭte sin aŭdigas.
La ranet'
en la verda kalsonet'
saltas kaj en momentet'
ĝi sin enakvigas.

Traduko de la Basgermana poemo "Dat Pöggsken" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2001-07.01.*

MR-359-1a / Arg-520-1024 (2012-07-20 20:25:43)

Profesoro d-ro Hans Taubken, kunlaboranto kaj estrarano de la societo "Augustin Wibbelt", afable permesis al mi, Manfred Retzlaff, per retletero de l' 30.04.2008 la enretigon de miaj tradukoj de poemoj de Augustin Wibbelt. Vidu ankaŭ la retejon de la societo "Augustin Wibbelt": `http://www.muenster.org/wibbelt/`.